

# STARO

**N-ro 4/2010 (237)**

**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



**Konferenco de ĈeĤa Esperanto-Asocio  
Poděbrady 24. - 26. 9. 2010**

*foto Libuše Dvořáková*

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,  
4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, p/a Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea@esperanto.cz

**Identec-numero (IČ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz

**Libroservo:** p/a Anna a Jiří Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, pri informadiko

**Komisiono de ĈEA:** pedagogia

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

**BANKO-KONTO de ĈEA:**

195 230 825 / 0300

**Poštovní spořitelna Poděbrady**

## Komitato de ĈEA:

**Prezidantino:** Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz (reprezentado de ĈEA, kunordigado, internaj asociaj rilatoj, metodiko)

**Vicprezidanto:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz (internaciaj rilatoj, fakaj aplikoj de Esperanto, ĈEA-retkomunikoj, eldona agado)

**Vicprezidanto:** Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, tel. 602 611 584, Tomecek@esperanto.cz (muzeo, konferencoj, TTT, ekster-asociaj rilatoj)

**Sekretario:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz (protokolado, korespondado, rilatoj kun la banko)

**Kasistino (komitatano A de UEA):** Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, libusehyblova@seznam.cz, 774 928 974 (membrobazo, kontado)

**Komitatanino:** Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavladvorakova@tiscali.cz (kluboj, projektoj)

**Komitatano kaj redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 530 319 263, malovec@volny.cz (sekcioj, komisionoj)

**Ĉefdelegitino de UEA por Ĉeĥio kaj UK-perantino:** Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 603 444 828, Lucie.Karesova@seznam.cz

## Kontrolgrupo de ĈEA:

**Prezidantino:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 461 532 257, dvor.libuse@seznam.cz

Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 332 339, vhirsx@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 00 Pardubice, Ludmila.Srbova@seznam.cz

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorfer domo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy, direktorino: Blanka Cuhelová, tel. 461 532 704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

**Kontrollegis:** Sabine Hauge, Pavel Polnický, Vratislav Hirš.

## Konferenco de ĈEA

Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio okazis en Poděbrady (24.-26.9.2010), konata banurbo, de kiu devenis la ĉeĥa reĝo Georgo de Poděbrady (1420-1471), kiu kiel unua proponis ligan de eŭropaj nacioj, kvankam sensukcese. En sia knaba aĝo vizitadis la urbon Franz Kafka, kies avino loĝis ĉe la urba placo. Proksime de tiu loko troviĝas parko kun aleo Esperanto, kiun prizorgis Ladislav Fiala. Nun loĝas en la urbo la sekretario de ĈEA Pavel Polnický, la ĉefa organizanto de la konferenco.



*foto Jana Melichárková*

Proksimume okdeko da esperantistoj loĝis kaj konferencis en agrikultura lernejo kaj internulejo. La programo komenciĝis vendrede post vespermanĝo en aŭla salono per projekciado de reklamoj pri nove eldonitaj libroj de la eldonejo KAVA-PECH, kiujn ĉiu povis aĉeti aŭ almenaŭ trafoliumi en la apuda ĉambro, kiu servis kiel kafejo kun libroservo.

Al la ĉefa konferenca traktado estis dediĉita la sabata antaŭtagmezo en la

salono, kie la asociaj komitatanoj prezentis siajn raportojn pri la agado de la asocio dum la pasinta jaro. Sekvis diskutoj de klubaj reprezentantoj. Ekz. la klubanoj de Mladá Boleslav anoncis sian intencon prizorgi memortabulon por d-ro Josef Hradil (aŭtoro de medicina terminaro en Esperanto), por kies realigo ili kolektas monon. Post la tagmanĝo Pavel Polnický gvidis promenon tra la urbo, prezentis la plej interesajn banurbajn vidindaĵojn. Je la 16-a horo en la salono la konferencanoj konatiĝis kun la nova asocia retejo danke al projekciado sur grandan ekranon. La vesperan amuzon komencis loka vakermuzika dancgrupo de emeritoj (meza aĝo 70 jaroj), la tombolon jam tradicie gvidis humure Kvido Janík.



Dimanĉe antaŭtagmeze la konferenco diskutis pri Esperanto en la moderna mondo kaj pri planoj de ĈEA por la plej proksima tempo. Ekz. pri planoj de ekspozicioj en la Esperanto-muzeo en Svitavy, pri reta kontaktigo de ĉiuj kluboj kaj pri propono prezenti ilian laboron en la asocia retejo kaj pri projekto Memoro

de la ĉeĥa Esperanto-movado k.s. Posttagmeze proksimume trideko da homoj forveturis buse al proksima vilaĝo Přerov nad Labem, kie ili rigardis grandan skanzenon.

Venontjare okazos asocia kongreso, tio signifas, ke estos elektita nova asocia komitato.

*Miroslav Malovec*

El la konferenca etoso:



# MOZAIKO – NOVA VIKIMAGAZINO DE INTERESAĴOJ

komencis aperi 3.9.2010 en la ĈEA-retpaĝaro [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) en la rubriko Aktualajoj. Tiu ĉi projekto redaktata de Pavla Dvořáková celas precipe proponi altkvalitajn artikolojn pri interesaj temoj el E-Vikipedio kaj tiel emigi esperantistojn al pli ofta utiligado de ĝi. Aperante dulingve en la ĉeĥlingva versio de la retpaĝaro ĝi celas krome ĉeĥlingvan neesperantistan publikon prezentante Esperanton kiel egalvaloran lingvon kapablan alporti aktualajn informojn pri ĉiuj homaj fakoj.

La unua numero <http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/mozaiko-nova-vikimagazino-de-interesa-oj-prezentas-sin.html> kondukas nin al Armenio, konatigas kun historio de Inkaa imperio, kun muziko de F. Chopin, vivo de Gandhi, delfenoj, aikido, kanto de Kajto k.a.

La dua numero <http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/vikirevuo-mozaiko-n-ro-2.html> alportas informojn ekz. pri korea lingvo, vivperipetioj de Budho, historio de ventra danco, optika iluzio, sekretoj de briĝo, la damnita poeto Arthur Rimbaud, slovaka E-dublita filmfabeleto k.a.

La tria numero temas pri Marko Polo, Anna Karenina, eŭska lingvo, Majo de Mácha kaj aliaj temoj.

Vi estas bonvenaj legi por vi interesajn artikolojn, rekomendi la magazinon al viaj geamikoj kaj sendi proponojn por kontribuajoj en sekvaj numeroj.

Retpoŝtadreso de la redakcio:  
[komputado@esperanto.cz](mailto:komputado@esperanto.cz).

# Memor-tabulo por Josef Hradil

Eble interesas ĉiujn, kiuj kontribuis al la memortabulo por nia kara doktoro Jozefo Hradil dum konferenco ĈES en Poděbrady.

La sumo post la konferenco estas 2.700 Kč, do la realigo estas certa, laŭ nia opinio printempe. Oni povas plu kontribui al la konto ĉe ĈES 195 230 825/0300 vs 63800, kie nia rondeto havas subkonton.

Krome mi volas atentigi, ke oni povas aĉeti libron en ĉeĥa lingvo „Člověk proti babylonu“ de francaj aŭtoroj René Centassi kaj Henri Masson je 150 Kč+afranko kaj je 60 Kč broŝuron „Legolibreto VI.“ en Esperanto de Jindřiška Drahotová - Sadová 745, Mladá Boleslav 293 01, tel.: 720 652 320, [drahotova@esperanto.cz](mailto:drahotova@esperanto.cz).



La asocia retejo invitas al la Marcipana Kristnasko en la Muzeo en Svitavy kaj al la nova Vikimagazino MOZAIKO.



## RETO DE LOKAJ/DISTRIKTAJ DELEGITOJ EN ĈEĤIO

La nombro de ĉeĥaj urboj, kie aktivas E-kluboj, bedaŭrinde malpliigatas, tamen estas nepre dezirinde havi sur distrikta nivelo almenaŭ lokajn reprezentantojn pri Esperanto. Tial la ĈEA-estraro venas kun ideo kompletigi la reton de kluboj per reto de lokaj/distrikta delegitoj, kapablaj ekz. informi pri Esperanto lokan gazetaron kaj individuajn interesigantojn pri lernado (sed NE nepre mem instrui ilin), helpi E-gastojn el eksterlando (gastigo en propra hejmo NE estas kondiĉo!), ev. – nedevontige – traduki turismajn materialojn pri sia urbo kaj ĉirkaŭaĵo aŭ laŭeble helpi kompletigi informojn pri la historio de la E-movado en la koncerna loko. Tiu funkcio sendube ne estas tro tempopostula kaj inkluzivas nur fojfojan engaĝiĝon, sed por ĝenerala prezento de nia movado sendube enesto de ĝuste VIA urbo estas tre grava! La reta kaj telefona kontaktoj aperus i.a. en [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) en la rubriko Kontakty. Ju pli densa nia reto estos, des pli imponan impreson (ankaŭ danke al via ev. engaĝiĝo) ĝi donos al la publiko!

Per tiu ĉi informo ni nur sondas la intereson de la membraro. Se principe vi pretus akcepti la rolon de delegito por via urbo, resp. distrikto, bv. nedevontige anonci vin kaj skribi viajn ideojn al: [pavla.esperanto@gmail.com](mailto:pavla.esperanto@gmail.com). Se reagoj estos pozitivaj, ni plu prilaboros la projekton kaj rekontaktos vin por precizigi la kondiĉojn. Ni antaŭgigas pri via kunlaboremo!

## Novajoj el la Laborgrupo pri tradukado de turismaj tekstoj



### Kastelo Kratochvíle

<http://www.ipernity.com/doc/tuurq/9468964>  
Filmo originale farita de V. Türk kaj tradukita Esperanten, la tekston legas Jan Fidel Řepa. La filmeto estos ankoraŭ kompletigita per titoloj kaj aldonaj informoj retligilo, retkontakto, situo surmape, ligiteco de la loko kun Esperanto ktp.

### Cyklotoulky – Netolice

<http://www.ipernity.com/doc/tuurq/9439941>  
Esperanto-subtekstojn – kun permeso de la ĉefrolulo – faris V. Türk

## Dublado de filmoj

Ĉu vi havas mirindan voĉon, aŭ via revo estas doni vian voĉon al grandaj aktoroj en filmo? Eble tiu projekto taŭgas al vi!

Se vi interesiĝas pri dublado de filmoj kaj laŭleĝa tradukado, vi povas aliĝi ĉe Google-dissendogrupo:

<https://groups.google.com/group/filmoj-senlimoj>

Por kompreni pri kio ĝi temas, vi povas legi la priskribon kaj la arkivon de la grupo.

*Francesco Costanzo*

# Propono de prioritatoj en ĈEA-aktivecoj

## 1. Informado pri Esperanto

1. Plibonigo de la retejoj de ĈEA kaj Muzeo de Esperanto
2. Finpretigo de la ĉeĥa traduko de la broŝuro „Malkovru Esperanton“
3. Kreo de „Minipakeo“ – flugfolieto pri Esperanto
4. Tago de eŭropaj lingvoj 26.9.
5. Realigo de migra ekspozicio „Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“ en pluraj urboj de Ĉeĥio
6. Kontribuado al gazetaro kaj radio

## 2. Instruado de Esperanto

1. Pli sistema informado pri korespondaj kursoj
2. Instrukiado de ĈEA-membroj pri uzado de *Lernu.net* (dum la ĈEA-kongreso)
3. Diskonigado de „Mazi en Gondolando“ (interreta videokurso + libro de inĝ. Vojáček)
4. Prilaboro de prezentaĵo kaj metodiko por gvidado de t.n. *Fulmokursoj* (por *Tago de eŭropaj lingvoj* kaj aliaj okazaĵoj)
5. Instruado en SET Lančov
6. Partopreno en la prepara etapo de la projekto de ILEI „Esperanto 125“

## 3. Internaj rilatoj

### 3.1. Membrodatumbazo

1. Kreo de nova pli stimula sistemo de membreco
2. Aktiva laboro kun membrodatumbazo, celata alparolo de membroj por unuopaj projektoj

### 3.2. Lingva klerigado de ĈEA-membroj

1. Laŭ intereso de legantoj larĝigo de la oferto de LIBROSERVO
2. Preparo de pruntoservoj en la asocia kaj muzea bibliotekoj
3. Klerigado pri utiligado de informoj en

Interreto (dum aranĝoj, en Starto kaj ĈEA-retejo)

4. Perfektiĝado pere de krea aktiveco pri diversaj projektoj – kreo de la asocia vikio por komunaj lingvoprojektoj (tradukado de tekstoj, kreado de lingvohelpiloj, sondosieroj ktp)

### 3.3. Kluboj

1. Kompletigo de prezentiĝo de kluboj en la ĈEA-retejo
2. Alvoko por partopreno de kluboj en asociaj projektoj (tradukado de turismaj tekstoj pri sia urbo (regiono, kontribuado al Vikipedio, sonregistrado, kolektado de informoj pri historio de E-movado en la koncerna urbo/regiono, komputila klerigado)
3. Plibonigo de elektronika komunikado (instigo al estigo de ret-adresoj, estigo de unuecaj adresoj  
[nomodelaklubo@esperanto.cz](mailto:nomodelaklubo@esperanto.cz))
4. Kompletigo de la reto de kluboj per la reto de lokaj/distriktaj delegitoj

### 3.4. Sekcioj, komisionoj kaj laborgrupoj de ĈEA

1. Aktivigo de sekcio pri informadiko pere de la nova asocia vikio (subsekcioj pri ciferecigado, fotado, sonregistrado, videofilmoj, ĈEA-retejo, datumbazo de artikoloj, klerigado)
2. Aktivigo de laborgrupo por tradukado de turismaj tekstoj (kaj ev. kunlaboro kun IKUE kaj KELI pri kristanaj memorindaĵoj)
3. Larĝigo de aktivecoj de la muzea grupo (je ekspoziciaj aktivecoj ĝenerale)
4. Subteno de LIBE-kongreso de nevidantoj en Olomouc (organizata de la ĉeĥa sekcio)

## 4. Eksteraj rilatoj

### 4.1. Kadre de Ĉeĥio

1. Videbliĝo en la retejo neziskovky.cz kaj Asocio de Neregistaraj Senprofitcelaj Organizaĵoj

2. Fari supervidon pri kontaktoj por ebla kunlaboro (reciproka informado, komunaj aranĝoj kaj programoj ktp.)

3. Kunlaboro kun aliaj E-organizaĵoj en Ĉeĥio (ĈEJ, AEH-IKEH, E-lingvo, Fervoja E-Asocio) – komunaj aranĝoj kaj kunagado en konkretaj asociaj projektoj

#### **4.2. Internacia kunlaboro**

- UEA – perado de kotizoj por UK
- E@I – komputila klerigado
- SKEF kaj AEF – preparo de komuna konferenco en 2012
- ILEI – partopreno en la projekto „Esperanto 125“ 2012)

#### **5. Financoj**

1. Reprilaboro de koncepto pri membreco en ĈEA (sistemo de rabatoj kaj avantaĝoj kaj ebleco de donacoj por konkretaj projektoj)
2. Prilaboro de subvencia programo rilata al triaĝuloj
3. Fari supervidon pri aliaj subvenciaj eblecoj (muzeo, regiona evoluo, komputila klerigado ks)

#### **6. Eldona agado**

1. Prikonsidero de finance nepostulaj miniatraj eldonoj
2. Minipakeo – flugfolio pri Esperanto
3. Broŝuro „Malkovru Esperanton“ (elektronike, laŭ financaj eblecoj ankaŭ paperforme)
4. Aktualigo de KD *Komputila klerigado*
5. Kantaro
6. Alia titolo laŭ konkretaj proponoj kaj eblecoj

#### **7. E-aranĝoj**

1. Okazigo de kongresoj (ĈEA, KELI, LIBE)
2. Preparlaboroj por komuna ĉeĥa-slovaka-aŭstra konferenco en 2012
3. Vikimania (26.-30.10. en Svitavy)
4. Sabla printempo (1.-3.4. en Milevsko)
5. Subteno de klubaj aranĝoj (klubaj jubileoj – 21.5. en Brno, 11.6., en Olomouc; aliaj: Svitavy, Putim, Česká Třebová, Písek ktp.)

### **8. Konkretaj projektoj**

#### **8.1. Muzeo de Esperanto Svitavy**

1. Okazigo de nova ekspozicio „Spiritaj tradicioj de la mondo kaj Esperanto“ kaj de programo de la Muzea Nokto (4.6.)
2. Plua kompletigado de la librofonduso kaj publikigo de la muzea katalogo en la ĈEA-retejo
3. Aktualigo de la muzea informpanelo kaj komputilo por muzeaj vizitantoj
4. Estigo de virtualaj ekspozicioj en la muzea retejo
5. Estigo de porokaza reta ĉeĥlingva muzea informilo

**8.2. Tradukado de turismaj tekstoj** – alŝuto de kreitaj materialoj al la nova viki, elekto de konvenaj tekstoj por traduko, komuna kreado de tradukvortareto, subtekstigado kaj dublado de mallongaj filmoj, okazigo de trejnado kaj laborokunsido de Sabla Printempo (1.-3.4. en Milevsko)

#### **8.3. Projekto „Karel Čapek“**

- Traduko kaj dublado de dokumenta filmo pri K. Čapek
- kreo de dulingva spegula legolibreto de elektitaj verkoj de Čapek
- Kreo kaj eldono de KD kun aŭdregistraĵoj de elektitaj verkoj
- Detaligo de vikipedia artikolo pri Čapek (fino de la projekto en 2012 – okazigo de aranĝo en Strž ĉe Dobříš kaj informado de ĉeĥa publiko kaj eksterlanda esperantistaro)

#### **8.4. Komputilaj projektoj:**

**8.4.1. Plibonigo de ĈEA- kaj muzea retejoj**, akirado de novaj kunlaborantoj

**8.4.2. Komputila klerigado de membroj** pere de ĈEA-retejo, instrua KD, seminario dum la ĈEA-kongreso, Vikimania



### **8.4.3. Ciferecigado**

1. Ciferecigado de E-tradukoj de ĉeĥa literaturo
2. Kolektado de artikoloj pri E-o en la enlanda gazetaro por asocia datumbazo
3. Skanado de E-fotaĵoj
4. Kontribuado al la nova datumbazo BRETARO
5. Klerigado de membroj (pere de ĈEA-retejo, KD, kongreso, Vikimano)
6. Havigo de bezonata programaro por realigo de la projekto

**8.4.4. Fonoteko** – registrado de voĉoj de aktivaj ĈEA-membroj, kreado de aŭdregistraĵoj (tekstoj beletraj, fakaj, instruaj, movadaj) – ilia arkivado en la reto kaj planado de ev. eldono en KD

**8.4.5. E-filmoj** – subtekstigado kaj dublado de mallongaj filmoj, instrukiado en la ĈEA-retejo, asocia vikio kaj KD kaj dum Sabla Printempo

### **8.4.6. Vikipedio**

1. Informado kaj instrukiado pri ĝia uzo kaj kontribuado
2. Realigo kaj informado pri la vikirevuo MOZAIKO (aperanta en la ĈEA-retejo)
3. Okazigo de Vikimano (Internacia renkontiĝo de E-vikipediistoj)
4. Ligo de aktiveco de vikipediistoj kun laborgrupo pri tradukado de turismaj tekstoj kaj laborantoj pri Memoro de E-movado

## **ESPERANTO-FILMETOJ**

Dum la vendreda vespero de la ĈEA-konferenco en Poděbrady estis i.a. prezentitaj specimenoj de pluraj filmoj, ĉu Esperante dublitaj, ĉu kun Esperanto-subtekstoj. Ĉar nemalmultaj spektantoj esprimis deziron havi la ligilojn por vidi ilin denove, ni publikigas ilin por vi:

**La Granda Diktatoro - The Great Dictator** (Specimeno el filmo de Ch. Chaplin kun Esperanto-surskriboj sur vendejŝildoj)  
[www.youtube.com/watch?v=PW6fmy0zz\\_4](http://www.youtube.com/watch?v=PW6fmy0zz_4)

**Kubo bonvenigas vin!** Ĉ. 10minuta profesia dokumenta filmo pri belaĵoj de la lando  
[www.ipernity.com/doc/97850/5988676](http://www.ipernity.com/doc/97850/5988676)

**Pisek** Profesia filmeto pri la urbo dublita Esperante (kadre de Sabla Printempo)  
[www.ipernity.com/doc/tuurq/8148958/](http://www.ipernity.com/doc/tuurq/8148958/)

**Mazi en Gondolando** (E-videokurso por komencantoj – 1-a leciono + ligiloj al sekvaj lecionoj)  
[www.youtube.com/watch?v=mWbyXVSiCxw](http://www.youtube.com/watch?v=mWbyXVSiCxw)

**Kapriol'! La Dolĉo de la Majo** (muziko)  
[www.youtube.com/watch?v=kdoVNb7WGwM](http://www.youtube.com/watch?v=kdoVNb7WGwM)

**Filmo pri filmo** (Instrukcia filmo pri prilaboro de filmetoj en Windows Movie Maker)  
[www.ipernity.com/doc/tuurq/8187576/](http://www.ipernity.com/doc/tuurq/8187576/)

**Kiel traduki en „La Ponto“** (Instrukcia filmeto por interesiĝantoj pri E-subtekstigado)  
[www.youtube.com/watch?v=lLYZyUjX8gw](http://www.youtube.com/watch?v=lLYZyUjX8gw)

**Kuĉjo kaj Maĉjo** (slovacia animacia fabelo dublita Esperante)  
[www.youtube.com/watch?v=KcNEoqGuWk8](http://www.youtube.com/watch?v=KcNEoqGuWk8)

Liston de pluaj interesaj E-filmetoj ni pretigas ankaŭ por [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) – sekvu ties rubrikon Aktualajoj. Interesiĝantoj pri la temo kaj precipe pri aktiva kunlaboro pri prilaboro de mallongaj filmoj en Esperanto, bv. skribi al [komputado@esperanto.cz](mailto:komputado@esperanto.cz).

-padv-

# ĈEĤA ESPERANTO- JUNULARO AKTIVAS

(laŭ oficiala organo de ĈEJ redaktata  
de Marek Blahuš, n-ro 4/2010)

Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) travivis eventoriĉan someron. En Kubo Marek Blahuš gvidis nome de KAVA-PECH 18-kapan kongres-turisman grupon, reprezentis ĈEA en la 95-a UK kaj ĈEJ en la 66-a IJK.



*Marek Blahuš en Kubo*

Dan Mrázek prezentis Esperanton en ĵurnalisma tendaro, Mirek Hruška en SET Lančov. Bára Závodská vartis esperantistajn denaskulojn en Francio kaj gastigis esperantistojn en Belgio. Jiří Galuška kun Juraj Procházka (SKEJ) vizitis Krimeon. Petr Dohnálek kun Marek Blahuš ĉeestis jubilean IKUE-kongreson en Parizo. Miloš Veselý, Marek Blahuš, Vlasta Pištíková kaj Vít

Mišurec partoprenis Someran Esperanto-Studadon en Piešťany, la lastaj du ankaŭ la IJS-n en Pécs.

La 20-an de junio Marek Blahuš kaj Mirek Hruška ĉeestis la tradician ĉeĥan-polan-slovakon supreniron al Ĉantorio, okaze de kiu antaŭ 5 jaroj finfondiĝis ĈEJ. Semajnon antaŭe dum la Esperanto-muzeonokto en Svitavy ĉeestis 7 ĈEJ-anoj (inter ili hispano Cesáreo García Fernández studanta en Brno). Jam komence de junio Vlasta Pištíková kaj Vít Mišurec ĉeestis la renkontiĝon "Blue floras la genciano" en Aŭstrio.

La ĈEJ-vicprezidanto Marek Blahuš fariĝis staĝanto de [E@I](mailto:E@I) en Nancy (Francio), per la EU-programo ERASMUS. Li forestos ĝis majoj 2011 kaj atingebblas rete, aŭ telefone ĉe +33 760168165. Jam aŭguste li ĉeestis la aranĝon FESTO apud Tuluzo, septembre li instruis en germana-franca seminario en Rastatt. Fine de junio Radio Proglas aŭdigis intervjuon kun li, parte pri Esperanto.

Mirek Hruška kunlaboris kun Pavla Dvořáková kaj anstataŭis ŝin dum septembra komputila seminario en Česká Třebová. En la revuo Kontakto 2010:3 (237) kun temo "Urboj - interesaj kaj impresaj" aperis lia artikolo pri Brno. Krom respondi pri aranĝoj de ĈEJ, fine de junio li fariĝis komitatano de la asocio E-lingvo.

De la 24-a ĝis la 26-a de septembro Daniel Mrázek kun Jana Grosmanová partoprenis la aranĝon ArKonEs en Poznań. Samtempe Mirek Hruška reprezentis ĈEJ dum la ĈEA-konferenco en Poděbrady. Renkontiĝo en la Praga zoo la 2-an de oktobro 2010 kunvenigis 8 esperantistojn (el ili du novuloj).

-mb-

## Ĉeĥa Esperanto-Junularo renkontiĝis en Žirovnice

*Ekde la 12-a ĝis la 14-a de novembro 2010 renkontiĝis junaj ĉeĥaj esperantistoj en ĉarma urbeto Žirovnice situanta en Bohemia-Moravia Montetaro. En Ripozdomo de Esperanto gastigis ilin konata teologo, psiĥiatro kaj verkisto Max Kašparů. Kadre de la renkontiĝo, kiun partoprenis ankaŭ samideanoj el Slovakio kaj Aŭstrio, okazis ankaŭ la ĝenerala asembleo de ĈEJ, dum kiu estis elektita nova estraro de la organizo por la venonta jaro.*



Al la renkontiĝo venis ĉirkaŭ 20 partoprenantoj – krom la membroj de ĈEJ ankaŭ iliaj iom pli aĝaj laŭ kalendaro sed anime junaj geamikoj. Ĉeĥan Esperanto-Asocion oficiale reprezentis Pavla Dvořáková. Ĝi okazis en pastora centro en Žirovnice, kiun loka diakono kaj esperantisto Max Kašparů dediĉis kiel „Ripozdomon de Esperanto“ al esperantistoj. Kiel dankesprimo por liaj agemo kaj helpemo antaŭ nelonge la komitato de ĈEJ atribuis al li honoran membrecon de la organizo. Post Petro Chrdle,

Miloslav Šváček, Josef Vojáček, Miroslav Malovec kaj kardinalo Miloslav Vlk li iĝis la sesa honora membro de ĈEJ.



La etoso de la tuta renkontiĝo estis amikeca, amuza kaj ripoziga. Junuloj kun ĝojo uzis tiean „tablan futbaleton“, babilis, ridis, ĝuis partoprenon de eksterlandaj gastoj – unu slovakoj kaj du aŭstroj. Sabate la 13-an de novembro antaŭtagmeze Max Kašparů ĉiĉeronis por ili en Žirovnice, krom kastelo (bedaŭrinde pro la vintra fermo nur de ekstere) li montris al ili ankaŭ someran naturan teatrejon, kie Max mem aktoras.



Posttagmeze okazis la plej oficiala parto de la renkontiĝo – la ĝenerala asembleo. Dum ĝi estis traktata la pasinta jaro, dum kiu ĈEJ precipe festis la 5-an datrevenon de sia refondiĝo. Ĝuste tio trafis ankaŭ amas-komunikilan sukceson, ĉar la gazetararan komunikon eldonitan de ĈTK (Ĉeĥa Gazetaragentejo) transprenis kelkaj retaj ĵurnaloj inkluzive de Novinky.cz. Ankaŭ Ĉeĥa Radio tri-foje elsendis pri la datreveno .



Kadre de la asembleo estis elektita nova estraro por la venonta jaro. La plej gravaj postenoj restis sen ŝanĝo, do la prezidanto restas Daniel Mrázek, la vicprezidanto daŭre estas Marek Blahuš kaj la kasisto estas Dagmar Chvátalová. En la komitato kiel membro restis Barbora Závodská kaj nove elektita estas Vít Guiglielmo Mišurec, kiu anstataŭis Miroslavon Hruška, kiu kun Tomáš Břicháček kaj Karol Rydlo iĝis membro de la revizia komisiono.

La programo daŭris ankoraŭ dimanĉe antaŭtagmeze per sankta meso. Parto de ĝia prediko estis speciale dediĉita al junaj esperantistoj, ĉar ĝi

estis en la internacia lingvo. Max Kašparů parolis en ĝi pri mirakloj – ke por kristano ĉio estas miraklo – eĉ „nura“ folieto de floro aŭ okuloj de infano.

Tiel honeste finiĝis la renkontiĝo. La partoprenintoj disvojaĝis hejmen kaj antaŭ la renovigita estraro malfermiĝas ĝiaj nunaj taskoj. Elkoran dankon al ĉiuj, kiuj per partopreno kontribuis al la belega etoso de la renkontiĝo kaj precipe kaj tute ne lastavice al Max Kašparů, ĉar la sukceso de la renkontiĝo estas ĉefe lia merito.

*Dan Mrázek  
fotoj Vlasta Pištíková*

*Pri la renkontiĝo de ĈEJ en Žirovnice informis ankaŭ loka Pelhřimovský deník (Ĵurnalo de Pelhřimov). La du aperintaj artikoloj **Žirovnickým pastoračním střediskem znělo esperanto** (En pastora centro en Žirovnice sonis Esperanto) kaj **Esperanto nezná věkové hranice** (Esperanto ne konas aĝlimojn) legeblas rete ĉe*

*[http://pelhrimovsky.denik.cz/zpravy\\_region/20101114pe\\_esperanto.html](http://pelhrimovsky.denik.cz/zpravy_region/20101114pe_esperanto.html) kaj [http://pelhrimovsky.denik.cz/zpravy\\_region/20101114pe\\_storka.html](http://pelhrimovsky.denik.cz/zpravy_region/20101114pe_storka.html)*



## Modernaj teknologioj por Esperanto

estis temo de ĉi-jara KAEST okazinta en Slovakio, en Modra-Harmónia, 30 km de Bratislava, en la tagoj ekde la 18-a ĝis la 21-a de novembro 2010. Organizis teamo E@I, precipe Peter Baláš. Ĉeĥaj helpantoj Marek Blahuš kaj Pavla Dvořáková gvidis trejnseminarion pri Vikipedio, Miroslav Hruška filmis kelkajn prelegojn.

Aliĝis kvindeko da personoj kun trideko da prelegoj prezentitaj dum tri tagoj en du paralelaj blokoj. Venontjare la prelegaro aperos libroforme.



Do kion novan oni povis tie trovi?

Alòs Hèctor i Font kun Jacob Nordfalk priskribis la programon **Apertium**, kiu ebligas maŝinan tradukadon inter lingvaj paroj, ankaŭ el la hispana, kataluna kaj angla al Esperanto. Eckhard Bick prezentis projekton **WikiTrans**, kiu aŭtomate esperantigas la artikolojn el la angla Vikipedio (reta enciklopedio). Dum la Esperanta Vikipedio havas nur 140 000 artikolojn, la angla havas jam 3 500 000, ĉar kunlaboras multe pli da homoj. WikiTrans scias esperantigi artikolojn sufiĉe bone (jam 2 500 000 tradukitaj),

do esperantistoj povas kontentiĝi per ili aŭ post polurado enmeti ilin en la Esperantan Vikipedion. La sama preleganto parolis ankaŭ pri **DeepDict**, **reta vortaro de vera lingvouzo**, kiu ebligas konstati, kiam oni uzas *scii* kaj *koni*, kiamaniere oni aplikas la verbon *komenci* k.s.



Se vi jam verkis esperantlingvan tekston, vi certe deziras, ke iu kontrolu ĝin kaj trovu mistajpojn kaj erarojn. Marek Blahuš klarigis, kiel funkcias **Literumkontrolo por Esperanto**, kiun li ellaboris kiel sian bakalaŭran studlaboraĵon. Sonja Petrović Lundberg prezentis **Lingvohelpilon por Esperanto**, kiu kontrolas la gramatikon, kaj **Paralelan korpuson en Esperanto**, kiu ebligas kompari grandajn esperantlingvajjn tekstojn kun angla versio (ekz. Andersen-fabelojn) por trovi ekvivalentojn de frazeologiaj esprimoj kaj por similaj esploraj celoj. Toon Witkam montris, kiel la programo **ESPSOF** videbligas sur ekrano strukturon de Esperanta derivaĵo kaj programo **GugloKVEK** scias vidigi, kiel certa vorto nun estas vere uzata en la reto. Kaj certe vin interesus prelego de Jacob Nordfalk **Poŝtelefonoj kaj Esperanto** pri telefonoj Android, kiuj kapablas uzi Esperanton.

Ilona Koutny skizis la historion de klopodoj apliki komputilojn por internacia lingvo (**Esperanto en komputa lingvistiko – retrorigardo**) kaj Konstantin Hlyzov klarigis, kiamaniere la komputiloj komprenas tekstojn (**Perkomputila tekstokompreno: ĉu pli facile en Esperanto?**). Bart Demeyere proponis vikian vortaron **ViVo**, troveblan en la reto (<http://kono.be/vivo>), Marcos Cramer prezentis la projekton Naproche, kiu studas matematikan faklingvon (**Komputlingvosciencia kaj logika analizado de matematikaj tekstoj**).

En la paralela bloko oni prelegis pri aferoj ekster la ĉefa temo. Detlev Blanke parolis pri **Festlibroj kiel nova fakliteratura ĝenro** en Esperanto kaj kiel ekzemplon li elektis la festlibron por Tonkin *La arto labori kune*. En sia dua kontribuo li prezentis la germanan societaton pri interlingvistiko **GIL** (Gesellschaft für Interlinguistik). Lia edzino Wera Blanke kolektis spertojn por **Publike paroli – kelkaj praktikaj aspektoj**.

La naturon en KAEST reprezentis prelegoj de Stano Marček **Kuracaj plantoj** kaj de Stefan Panka (Germanio) **Lexicon silvestre en nova aspekto - Wikipedia projekto**. Tiu ĉi arbara leksikono en pli ol 20 lingvoj (ankaŭ la ĉeĥa) uzas Esperanton kiel gvidan lingvon.

Ankaŭ la tekniko ne mankis: **Fotoaparatoj** (Peter Novotníček), **Fiask-sekureco en elektromekanikaj sistemoj** (Konstantin Obratsov), **Memregaj aŭtomobiloj** (Francesco Maurelli), **Hardigi metalajn materialojn per hejtraktado** (Johannes Mueller).

La buntecon de la programo pravas prelegoj el diversaj fakoj: **Sociologia esploro de E-movado** (Zbygniew Ga-

lor), **Semantika Interlingvo** (Sean Healy), **Terminologiaj registraĵoj** (Mélanie Maradan), **Valenta modelo de verbo el kontrasta vidpunkto en la slova, germana kaj Esperanto** (Katarína Nosková), **Aplikoj de inform-teknologioj en interkultura pedagogio** (Radojica Petrović), **Statistika pruvo pri kongruenco inter parola kaj skriba KER-ekzamenoj** (Iván Bujdosó), **Sonlibroj en Esperanto** (Stano Marček), **Pola Radio en Esperanto** (Barbara Pietrzak), **Innotrans – spertoj el la plej grava fervoj-foiro de Eŭropo** (Jan Uldal Niemann), **Speleologio kaj Esperanto** (Ján Vajs), **Sciencfikcio kaj Robotoj** (Toon Witkam).



Petr Chrdle parolis pri la konferencoj SAEST kaj KAEST ekde 1978 (**Du gravaj serioj de Scienc teknikaj aranĝoj en Meza Eŭropo**) kaj Peter Baláž skizis, kiel la teamo E@I daŭrigos la serion kaj ankaŭ siajn projektojn Lernu, Bretaro, Edukado, Interkulturo k.s. (**E@I – ĝia vojo en la E-movado**).

En la mondo senĉese aperas novaj inventoj, el kiuj multaj povas helpi al nia laboro, tial necesas sekvi la evoluon.

*laŭ [www.ikso.net/kaest/](http://www.ikso.net/kaest/)  
fotoj Petr Novotníček*

## La 6-a SABLĀ PRINTEMPO



**1.-3. 4. 2011**

- \* trejnseminario pri tradukado de ĉiĉeronaj tekstoj kaj urbaj turismaj retejoj
- \* trarigardo de la **monaĥejo de Milevsko** kaj de pilgrimekspozicio pri Esperanto en la urba biblioteko
- \* babil-, film- kaj muzikvespero

Informiĝu kaj aliĝu ĉe:

[pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)

**MIGRA EKSPozICIO PRI ESPERANTO** kiu okazis en marto/aprilo 2010 en Písek, estos prezentata dum 2011 en pluraj aliaj urboj.

La unuaj estos:

**1.-28.2.** en Sudbohemia Scienca Biblioteko en České Budějovice (strato Lidická n-ro 1, teretaĝo en ekspozicisalono kun elektronikaj katalogoj ([www.cbvk.cz](http://www.cbvk.cz)))

**1.-30.4.** en Urba biblioteko en Milevsko (t.n. malnova urbodomo ĉe la ĉefplaco – nám. Edvarda Beneše n-ro 1, en unua etaĝo). ([www.knihmil.cz](http://www.knihmil.cz))

Ĉiam la lastan tagon posttagmeze okazos prelego kaj diskuto pri Esperanto por publiko. Esperantistoj kaj iliaj gastoj kompreneble bonvenas! Informoj pri sekvaj okazlokoj aperos en Starto 2011 n-ro 1.

Fotogalerio de la ekspozicio troviĝas en [http://esperanto1.rajce.idnes.cz/Putovni\\_vystava\\_Je\\_esperanto\\_mrtvy\\_jazyk/](http://esperanto1.rajce.idnes.cz/Putovni_vystava_Je_esperanto_mrtvy_jazyk/)

Informiĝu ĉe: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz), P. Dvořáková tel. 774 942424

Ekde novembro 2010 la retpaĝaro de Urba Biblioteko en Písek enhavas apud la germana kaj angla versioj ankaŭ la Esperantan! Vidu [www.knih-pi.cz](http://www.knih-pi.cz) sur la enirpaĝo supre maldekstre. Viaj salutoj kaj laŭdleteroj estas dezirindaj! Bv. skribi koncize al [reditel@knih-pi.cz](mailto:reditel@knih-pi.cz). Antaŭdankon por via subteno!



16.10.2010 ĝisvivis en enviinda mensfreŝeco kaj infekta bonhumoro sian 95-an naskiĝtagon s-ino Marie Krátká, delonga aktiva membrino de EK Písek.

Sincerajn gratulojn!

Ne forgesu regule vizitadi la retejon de ĈEA [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz)!

En ĉeĥa kaj esperanta versioj ni pretigas por vi tie aktualizaĵojn kaj aron da utilaj informoj por via lernado kaj utiligado de Esperanto. Aktivaj kontribuantoj kaj kunlaborantoj serĉatas!

Kontakto: [komputado@esperanto.cz](mailto:komputado@esperanto.cz)

PaDv

## Enretigitaj gazetoj

ĉe Viena Planlingva Kolekto troveblas laŭ jena adreso:

<http://anno.onb.ac.at/cgi-content/anno-plus?apm=0&aid=e1a>

La lastan **a** ŝanĝu al **b** aŭ **c** aŭ **d**, vi trovos la gazetojn Germana Esperantisto, Literatura Mondo, Pola Esperantisto kaj Brita Esperantisto.

-mm-

# RAPORTO DE ELEKTOKOMISIONO DE ĈEA

En la ĈEA-kongreso okazonta 2011-10-07/09 en Šumperk efektiviĝos ankaŭ balotoj, do oni elektos la novajn komitaton kaj kontrolan grupon de ĈEA. Jam komencis labori elektokomisiono en la konsisto: Petro Chrdle (gvidanto), [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz), Věra Podhradská, [podhradska@volny.cz](mailto:podhradska@volny.cz) kaj Marek Blahuš [marek@blahus.cz](mailto:marek@blahus.cz)

Ni tre petas vin mem kandidatiĝi (validas nur por la membroj de ĈEA), se vi sentas vin konvena por partopreni la gvidan rolon en la asocio, aŭ rekomendi kandidatojn. Per tio vi ege helpas al la laboro de la elektokomisiono.

Antaŭdankon por via helpo elekti novan efikan gvidorganon.

## NOVA EKSPozICIO EN ESPERANTO-MUZEo PREPARATA

Bv. ne forgesi, ke en Svitavy estas Esperanto-muzeo kun daŭra ekspozicio pri la Esperanto-movado kaj ties historio, kaj krom ĝi ankaŭ portempa ekspozicio. Tiu dua momente prezentas la verkon de la ĉeĥa humoristo, desegnisto, ilustristo kaj esperantisto Pavel Rak. Ĝi daŭros ĝis majo 2011.

Do jam nun ni kolektas materialojn por la sekvanta portempa ekspozicio, kies temo estos „Esperanto kaj spiritaj tradicioj de la mondo“. Se vi posedas iujn materialojn pri religioj aŭ filozofioj kaj iliaj rilatoj al Esperanto, ni tre petas

vin pri kontribuo al tiu ekspozicio. Viajn objektojn vi povas donaci al la muzeo (tiukaze ili restos post la fino de la ekspozicio en la deponejo), aŭ almenaŭ pruntedoni, tamen bv. kalkuli kun tio, ke la ekspozicio daŭros 12 monatojn ĝis majo 2012.

Objektojn konvenajn por la ekspozicio, kiujn vi pretus pruntedoni, bv. ne tuj sendi al la muzeo, sed unue nur priskribi (laŭeble kun fotografaĵo aŭ almenaŭ detala priskribo), por ke la muzea grupo povu unue prijuĝi, ĉu ili vere povos esti uzataj por la ekspozicio. La rezulton oni komunikos al vi. Antaŭdankon al ĉiuj, kiuj helpas, ke la ekspozicio estu kiom eble plej informriĉa kaj samtempe estetike bela. Info:

[dvor.libuse@seznam.cz](mailto:dvor.libuse@seznam.cz)

## Novaj materialoj en STEB

Sukcese finiĝis la translokiĝo de Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko (STEB) al la nova servilo: <http://www.eventoj.hu/steb/>

### Novajoj:

3D-teknologio – Bohemia kratero (P. Rajlich) – Ciklo en la geologia evoluado de la Tero – Milita Vortaro – Kudra-Trika terminaro – Naetrocymbe saxicola, likeno kun Trentepohlia – La suno malvarmiĝas... – Pokera vortareto – Pedagogia terminaro – Medicina vortaro – Doppleraj efikoj ĉe Schwarzschild – Baza Radikaro Oficiala – 8-lingva medicina listo por urĝaj kazoj – Internacia Kongresa Universitato, IKU (2008) – De la centro de la universo ĝis la spacoŝipo Tero – Ekonomiko kaj lingvo – Denaskaj kor-malsanoj – Likenoj kaj nelikeniĝintaj fungoj likenloĝaj de Francio – Lyme-malsano aŭ 'Borelioza Lyme' (malsano, disvastigita de iksodoj) – Pri la kuracado de ŝankro per varmo – Utileco kaj ebleco de internacia helplingvo en medicino (1908) – Pekoteko – Terminaro pri Doplera efiko – Avionary (nomoj de ĉiuj birdoj) – Angiogenezo (nova metodo kontraŭ kancero) – Lernolibro pri la programlingvo pitono – Funkciado de kaldronoj  
*Szilvási László*



## Honorigo por esperantistino

Zsófia Kóródy el Herzberg dum solena festo en la kavalira salono de la kastelo Herzberg am Harz ricevis publikan distingon por pli ol sepjara honorofica aktiva agado sur diversaj kampoj por Esperanto kaj la oficiala Esperanto-urbo Herzberg.

Urbestro Gerhard Walter emfazis ŝian multflankan kaj senlacan agadon, ekz. por la GEA-filio por klerigado kaj kulturo, kiel prezidantino de AGEI, kiel komisiitino de GEA por instruado, organizantino por internaciaj lernejoj projektoj, por la sukcesaj ĝemelurbaj aktivecoj inter Herzberg kaj Gora (PL), plie ŝiajn meritojn rilate al la enkonduko de Esperanto-ekzamenoj laŭ KER, kiel estrarano de ILEI, meritojn pri la granda Esperanto-biblioteko en Herzberg, ktp.

La ĉefo de la Esperanto-urbo aparte dankis al Zsófia Kóródy kaj transdonis gratuldokumenton kaj ombrelon kun la bela surskribo „Herzberg ... la Esperanto-urbo“. Ĉeestis nemalmultaj politikistoj kaj reprezentantoj de aliaj asocioj kaj kulturgrupoj.

Gerhard Walter substrekis la valoron de Esperanto por Herzberg kaj anoncis akceladon de la poresperantaj agadoj. Jen bonaj ekzemploj: baldaŭa fondo de speciala Fondaĵo Esperanto-urbo Herzberg, starigo de tiel nomataj „kontinentaj Esperanto-domoj“, ekz. „Azia Esperanto-domo“.

*Petro Zilvar el Herzberg  
Harald Mantz el Osterode*

**<http://esperanto-urbo.de>**  
sub „Fotoalbumoj“ troviĝas fotoj  
pri la evento

## TORPEDO-6

estas grava pedagogia kunveno de ILEI-Germanio (AGEI) kaj Interkultura Centro Herzberg (ICH), ĉi-jare organizita kun ILEI kaj kun parta subvencio de UEA.

La ĉeftemo de la 5-taga seminario estis sukcesaj eŭropaj projektoj kaj subvencipetado. En la lastaj jaroj Interkultura Centro Herzberg kunagadis en kelkaj internaciaj projektoj: ekz. COMENIUS por la loka Nicolai-lernejo, GRUNDTVIG por la trejnado de Esperanto-instruantoj de la tria aĝo.

Inter la prelegantoj estis Stefan MacGill, Radojica Petrovic, Zlatko Tišljar, Peter Zilvar, Zsófia Kóródy; estis traktataj projektebloj kaj akireblaj subvencifontoj kun konsilado kaj praktika helpado al projektontoj. Okazis ankaŭ estrarkunsido de ILEI.

La urbestro de Herzberg, Gerhard Walter vizitis la renkonton kaj salutis la partoprenantojn.

Tiu seminario pri projektoj por lerneja kaj eksterlerneja Esperanto-instruado kaj komuna planado por la estonto estis grava elemento en la serio de klerigesioj, kiuj regule okazas en Herzberg kaj celas ne nur instrukapabligon sed plivastigon de movadaj konoj kaj kontribuas al pli bona informiteco de nia Esperanto-kolegato.

Ankaŭ en 2011 ni organizos novan serion de klerigkursoj kaj instrukapbligaj seminarioj. La sekva okazos inter la 18-a kaj 20-a de februaro. Ĉeftemo: Esperanto-instruado, komputiloj kaj futuro. Bonvenon!

*Zsófia Kóródy  
kunlaboranto de ICH  
prezidanto de AGEI  
estrarano de ILEI*

## Universala kongreso en Danio!

La 96-a Universala Kongreso (UK) okazos en Kopenhago de la 23-a ĝis la 30-a julio 2011.

Kopenhago estas unu el la plej aĝaj kaj ĉarmaj urboj de Eŭropo, grandskale favorata de la internaciaj kulturaj avangardoj, kiuj daŭre emfazas la elstarecon de Kopenhago kaj ĝia atmosfero.

La kongreso okazos en Bella Centro, moderna kaj fleksebla kongresejo, tre facile atingebla per metroo, aŭto aŭ buso, nur 10 minutojn for de la urbo-centro.

La estraro de UEA decidis, ke la temo de la 96-a UK de Esperanto en Kopenhago rilatos al la Internacia Jaro de la Junularo, kun la temo ”**Dialogo kaj reciproka Kompreno**”. Oni celas per la temo ekkapti la energion, imagopovon kaj iniciatemon de la monda junularo en venkado de la defioj, kiujn la homaro frontas, ekde fortigo de la paco, ĝis progresigo de ekonomia evoluo.

Al UK 2011 **ne veturos ajna** buskaravano el Ĉeĥio, do ĉiu interesiĝanto devas mem prizorgi aliĝon, vojon, loĝadon ktp. Ĉeĥa Esperanto-Asocio peras kongresan kotizon kaj kaze de bezono helpas kun aliĝo.

Kiel aliĝi? Ni rekomendas aliĝi interrete ĉe [www.uea.org](http://www.uea.org) kaj same en tiu paĝo zorgeme legi ĉion pri la UK. Vi tie trovos ne nur necesajn organizajn informojn sed ankaŭ turismajn informojn, statistikon pri jam aliĝintaj esperantistoj ktp. Se vi bezonas helpon kun aliĝo, bonvolu turni vin al la ĉefdelegito [Lucie.Karesova@seznam.cz](mailto:Lucie.Karesova@seznam.cz), tel. 603 444 828.

Kiel pagi? Vi povas pagi vian kongres-

kotizon al la konto de ĈEA: 195 230 825/0300, varia simbolo: 06944. Ne forgesu informi L. Karešová pri via pago.

Indas aliĝi ĝis la fino de decembro (vi tiel pagos en la unua periodo, en kiu la alteco de la kongreskotizo avantaĝas) kaj esti individua membro de UEA!!!

**Kategorio 1:** individua membro de UEA (ne inkluzivas MG) 120 EUR

**Kategorio 2:** ne individua membro de UEA 150 EUR

**Kategorio 3:** komitatano / kunulo / junulo / handikapulo, mem individua membro de UEA 60 EUR

**Kategorio 4:** kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA 90 EUR

La alteco de kotizo en ĉeĥaj kronoj ĝis 31.12.2011 estas fiksita jene:

Kategorio 1: 3.120,-Kč

Kategorio 2: 3.900,-Kč

Kategorio 3: 1.560,-Kč

Kategorio 4: 2.340,-Kč

Kaze ke vi decidis partopreni la 96-an UK-on, bonvolu aliĝi kaj ĝiri monon al la konto de ĈEA ĝis 23.12.2010 – pro plua administrado rilate al UEA.

## Individua membreco en 2011

UEA havas aligitajn kaj individuajn membrojn. La aligitaj membroj estas tiuj membroj de aliĝintaj landaj asocioj, kiuj ne estas individuaj membroj de UEA. Por ili landa asocio pagas kotizon.

La individuaj membroj de UEA pagas mem jaran aŭ dumvivan kotizon. En 2009 UEA havis 5.713 individuajn membrojn en 124 landoj kaj 12.605 aligitajn membrojn en 69 landoj.

La individuaj membroj de UEA malpli ol 30-jaraj estas samtempe individuaj membroj de TEJO, ĝia junulara sekcio.

Kotizoj por Ĉeĥio jam estas fiksitaj de UEA kaj ili estas samaltaj kiel por 2010.

La plej uzataj kategorioj:

**MJ** Individua membro kun Jarlibro. La kotizo: 420,-Kč

**MJ(-T)** Individua membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkluzive 29 jaroj membro en TEJO kun Kontakto sen plia abonpago). La kotizo: 420,-Kč.

**MG** Individua membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado. Gvidlibro estas depesaĵo el Jarlibro sen la *Delegita Reto*. Atentu, tiu ĉi kategorio **ne ebligas al vi ĝui rabaton** de la kongreskotizoj por UK/IJK. La kotizo: 170,-Kč

**MA(-T)** Individua membro kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*, monata oficiala organo de UEA. La kotizo: 1.050,-Kč

**SA** Abono al *Esperanto*, sen membreco en UEA. La kotizo: 670,-Kč.

**Kto** Abono al *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO. La kotizo: 400,-Kč.

Nova individua membro devas sendi aliĝilon al UEA – plej malmultekoste pere de retpaĝoj de UEA: [www.uea.org](http://www.uea.org). Se vi bezonas helpon por aliĝi kiel individua membro, kontaktu la ĉefdelegiton Lucie Karešová.

La kotizon pagu al la konto de ĈEA kaj samtempe sendu informon pri la dato kaj pagita sumo al la ĉefdelegito. Foje la bank-kont-eltiro ne enhavas la nomon de la paginto.

Bankokodo: 195230825/0300. Varia simbolo: numero de via ĈEA-legitimilo + 06941. Kaze ke vi ne estas membro de ĈEA aŭ vi ne memoras la numeron de la legitimilo, enskribu 06941 kaj kontaktu la ĉefdelegiton por informi pri la pago.

## **Reta Jarlibro (= Interreta Jarlibro)**

Individuaj membroj de UEA povas konsulti la liston de la *Delegita Reto* per Interreto. La *Reta Jarlibro* prezentas la samajn informojn kiel via papera Jarlibro, kun la ĉefa diferenco, ke la interreta versio estas ĉiutage aŭtomate aktualigata, danke al rekta kunligo kun la komputiloj de la Centra Oficejo.

Necesas esti individua membro de UEA por eniri kaj por la unua vizito vi devas registriĝi. Dum la registrado oni devas indiki sian UEA-kodon kaj re-adreson konatan al UEA.

Plej facilas per la starta paĝo de la UEA-retejo: [www.uea.org](http://www.uea.org), kie estas ligilo nomata „Jarlibro“.

## **Delegita Reto en Jarlibro**

*Delegita Reto* estas reto de esperantistoj – individuaj membroj laŭ landoj kaj urboj. Ĉiu el vi povas fariĝi delegito kaj tiel doni iom de sia libera tempo kaj energio al aliaj esperantistoj.

Aliaj individuaj membroj rajtas peti informojn pri turismo, tekniko, scienco, instruado, Esperanto-movado ktp. Vi povas rekomendi hotelon, traduki mallongan leteron, aŭ simile. Vi rajtas rifuzi servon, se ĝia plenumo postulas multan labortempon, specialistajn sciojn, elspezojn.

Praktike ne venas multaj demandoj, tamen: denseco de *Delegita Reto* donas „bildon“ pri la movado en la koncerna lando. Se vi ne timas doni vian nomon kaj iom da energio por plidensigi la delegitan reton en Ĉeĥio kaj se vi estas individua membro, bonvolu aliĝi kiel delegito.

Informiĝu ĉe la ĉefdelegito Lucie Karešová, [Lucie.Karesova@seznam.cz](mailto:Lucie.Karesova@seznam.cz), 603 444 828.

## Malgranda rerigardo

En 1952 estis nuligita nia esperantista organizo en Ĉeĥoslovakio. La junularo reagis siamaniere. Gejunuloj en Třebíč ankoraŭ en tiu jaro organizis kursojn de Esperanto en la somera tendaro en la golfo de Chvalatice ĉe la digolago de Vranov. La Esperanto-junularo en Opava aranĝis similajn kursojn ĉe la rivero Moravice. La samaj kursoj aperis ankaŭ en aliaj somerumejoj. En 1957 en kursoj de Doksy ĉe Mácha-lago instruis prof. Kilian kaj lian instruadon partoprenis kelkaj esperantistoj el Třebíč. Inter ili estis du radioamatoroj el Svazarm (Asocio por Kunlaboro kun la Armeo), du Vladimiroj, Herman kaj Šulc. Ili uzis radion por kontaktoj kun esperantistoj el diversaj mondopartoj. Ili eĉ presigis por si t.n. QSL-kartojn en Esperanto. Tiun karton post ĉiu sukcesa konekto ili sendis al sia eksterlanda kamarado kiel konfirmon.



En 1957 mi soldate servis en Písek. En mia persona libera tempo mi instruis romaajn novulojn legi kaj skribi. Unu el superaj komandantoj petis min, ke mi instruu al li Esperanton, ĉar lia edzino-esperantistino ricevas leterojn de eksterlandaj viroj kaj li ne komprenas

ilin. Tiamaniere ni uzis ĉiun liberan momenton. En oktobro mi revenis al la civila vivo. Jam en novembro ni iris rigardi nian malnovan tendarejon apud Chvalatice kaj ni terurigiĝis, ĉar tie estis konstruitaj kabanaj. Tial ni transiris la frostiĝintan lagon kaj direktis nin al la golfo de Lančov. Tie ni trovis belan lokon, tuj poste ekis nia traktado kun instancoj. La rezulto baldaŭ venis – unua tendaro jam en 1958.



En la sama tempo organizis tendaron sub la ponto de Podolsko ankaŭ prezidanto de EK Písek, Libor Křivánek. La tendaron konstruigis por li mia eksa komandanto, kapitano Kořínek, kiu pruntis armeajn tendojn kaj kuirejon eĉ kun la kuiristo.

Reveninte el mia soldata servo mi denove eklaboris en Svazarm, kies distriktan komitaton gvidis tiam Vladimír Herman. Kun lia granda helpo ni konstruis la tendaron. Laŭ peto de esperantistoj, kiuj tiutempe havis nenian centron, la Ministerio pri Instruado kaj Kulturo fondis Ĉeĥoslovakian Esperantistan Komitaton kaj subordigis ĝin al Kleriga Instituto en Prago. Mi estis nomumita por ĝi kiel ĝia plej juna membro. La instituton estris s-ino Mansfeldová, kiu promesis certigi por nia tendaro ĉiutagan sciencopularan

prelegon. La promeson ŝi plenumis. Ĉiutage alveturis aŭto kun lektoro el Prago. Tiu prezentis sian unuhoran prelegon, banis sin en la lago kaj forveturis. Foje alveturis eĉ s-ino Mansfeldová mem. La viroj (kursanoj) ŝin taksis kiel allogan blondulinon. Al mi ŝi estis malpli simpatia. Ne plaĉis al ŝi, ke apud la tendaro starigis sian iglon (indiana tendo) pola kuracisto-esperantisto kun sia familio. Pri eksterlandanoj ni ne estis interkonsentintaj. Ŝi sciigis tion al la ministerio kaj tiu malpermesis pluajn tendarojn. Mi estis konsternita. Sed ne Vladimír Herman, al kiu mi konfidis mian problemon. Kun sia tipa rideto li konsilis al mi: fondu bazan organizon de Svazarm kaj daŭrigu tendarojn sub la aŭspicio de Svazarm. Vi bezonas minimume 5 personojn. Ni estas du, poste ankoraŭ Jaris Habeš kaj Franta Sklenář, mankas unu homo. Fine ni akiris esperantiston František Sedláček, direktoron de la Kulturdomo. La tendaro estis savita por pluraj jaroj.



Franta Sviták, sekretario de Mansfeldová, esperantisto kaj partoprenanto de kelkaj SET-oj sendis al mi kopion de la letero, kiun lia ĉefino sendis al la ministerio. „Malgraŭ la malpermeso la

tendaro plu funkcias. Tamen mi ne rekomendas intervenon. La ministerio de kulturo devus konflikti kun la ministerio de nacia defendo, al kiu apartenas Svazarm, la organizanto.“

Iris jaroj. La najbaraj tendaroj, kiuj apartenis al sindikatoj, modernigis. Ili konstruis kabanojn. Nia plej proksima najbaro Technolen donacis al ni siajn tendojn kun ekipaĵoj. Senpage! Ili servis plurajn jarojn. Tamen, tamen. Por konstrui kaj malkonstrui la tendojn, kiuj estis ĝis 50 (laŭ nombro de aliĝintaj partoprenantoj), ni estis du aŭ tri, la aĝo al ni malrapide kreskis. Mi rememoris denove pri Vladimír Herman. Li jam estis doktoro kaj plie la unua viro de la sudmoravia komunisma partio. Mi telefonis al li – mi venu al Brno, ni interkonsentos. Mi ekveturis al lia oficejo. Li bonvenigis min per la vortoj: „Ne koleru, mi ne havas multe da tempo. Sed mi interkonsentis kun la regiona turisma centro aĉeti por vi kabanojn kontraŭ duonmiliono. Kiam vi konstruos ilin, vi ricevos subvencion por ekipaĵoj.“ Kaj ricevis! Du milionojn! Aĉeton de la kabanoj interkonsentis Věra Podhradská kun sia iama samklasano, direktoro de lignofabriko en Trutnov. La kabanoj estis konstruitaj en 1982. Restas nur danki al Vladimír Herman. Li faris tre multe por Esperanto. Danko apartenas ankaŭ al miaj knaboj el la Esperanto-junularo en Třebíč.

*Pavel Sittauer*



## Kvinlingva vortaro inspirita per Ekotur

La historion de ekoturismaj renkontiĝoj kune kun la klarigo, kio estas ekoturismo, mi jam priskribis en Starto. Mi nun aldonu, ke la venonta Ekotur okazos de la 11-a ĝis la 18-a de septembro 2011. Dum ĝi oni loĝos en la pensiono Sokol en Dobřichovice apud Prago, kie ankaŭ okazos vesperaj programoj. La tagojn trapasos kaj biciklantoj, kaj piedturistoj en ties pitoreska ĉirkaŭaĵo, nome Bohemia Karsto kaj „Hřebený“, la plej orienta parto de Brdy-montetaro.

Sed mi revenu al la temo, kiun difinas la titolo de ĉi tiu artikolo. Dum la tradicio de Ekotur ni ofte renkontis ne nur ĉe esperantistoj-komencantoj, ke mankas vorto. Ĉu rilate al speco de paneo de biciklo, ĉu volante priskribi, kion oni rigardas. Kaj malmultaj pretas porti ĝeneralajn vortarojn, ĉar tiuj, en kiuj estus ankaŭ la bezonataj terminoj, ne tro ofte uzataj, estus memkomprene pezaj.

Dum la vesperaj diskutoj do eksonis revo ekhavi ekoturisman vortaron, en kiu estos ĝuste la terminoj, kiujn oni povus bezoni dum ekoturismaj renkontiĝoj kaj kiuj verŝajne mankus en poŝvortaroj ĝeneralaj. La malfacilan taskon fari bazon de la vortelekto akceptis Zdeněk Pluhař, aŭtoro de Ĥemia Vortaro ĉeĥa-esperanta kaj esperanta-ĉeĥa kaj plurfoja gvidanto de piedturismaj grupoj dum Ekotur, kiu ankaŭ ofte multe helpis al mi dum la preparo de itineroj kaj kiu jam kompilis por partoprenantoj liston de bezonataj vortoj pri naturo antaŭ la Ekotur en Kvilda (Montaro *Šumava*) en 2002.

Ni faris kelkajn interkonsentojn, nome:

1. Dum la elekto de terminoj oni limigu sin al la priskribo de la naturo en Meza Eŭropo, ĉar la vortaro servu precipe al la partoprenantoj de Ekotur-aranĝoj.
2. Oni evitu la ĝenerale konatajn vortojn, kiuj troviĝas en plejparto de lernolibroj kaj ĉiuj, eĉ etaj vortaroj, eĉ se tiuj estas renkonteblaj survoje (kiel pomo, akvo, ktp.)
3. La vortaro estu plurlingva, ke ĝin povu uzi ankaŭ eksterlandaj partoprenantoj de Ekotur.
4. La amplekso ne rajtas transpasi la poŝformaton, por ke ĉiu senprobleme kunhavu ĝin dum la turismado.



La vortaro, kiu momente estas redakte preta kaj baldaŭ aperos (do certe estos jam je dispono al la partoprenantoj de Ekotur 2011) estas verko de vere internacia aŭtoraro. Kiel dirite, la ĉef-aŭtoro respondeca pri la elekto de la terminoj kaj ĉeĥa kaj Esperanto-partoj estas Zdeněk Pluhař, pluaj respondeculoj pri la alilingvaj partoj estas Christopher Fettes por la angla, Manfred Westermayer por la germana kaj Raymond Skilling por la franca. Krome dum la provlegado kontribuis ankoraŭ pluraj fakuloj el Aŭstralio, Ĉeĥio, Germanio, Kanado kaj Slovakio. Tio devus garantii, ke la vortaro fariĝos vere utila kaj lingve fidinda helpilo, ne nur por la Ekoturanoj, sed por ĉiuj naturamikoj.

*Petro Chrdle*

## PASPORTA SERVO vás zve do svých řad!!

Ano je to jedna z možností jak využít znalostí esperanta a nebo se v něm zdokonalit, tím, že se stanete poskytovatelem bezplatného ubytování pro esperantisty a sám budete moci využít tuto službu při svých zahraničních cestách. Další informace vám poskytne Pavel Polnický (landa organizanto).

Kontakty - viz údaje na 2 str. obálky. Pokud již členy jste, zkontrolujte si údaje o vás v adresáři PS (nový vyjde v dubnu) a případné změny nahláste nejlépe do konce roku 2010.

## Ĉeĥa literaturo en la reto

*En dana literatura retejo aperis pluraj tradukoj el la ĉeĥa literaturo.*

Ĉe [www.literaturo.dk](http://www.literaturo.dk) vi trovos:

**Eva Suchardová** – Najado

**Kořínek** – 4 poemoj

**Čapek** – Sankta nokto - el Libro de apokrifoj (*tradukis Vespo*); – Kvin panoj – el Libro de apokrifoj (*tradukis Jaroslav Huda*) – Tondo (*tradukis Jautrais Ods*)

**Poemoj de Karolo Piĉ**

**Milda Jakubcová** – Viktimoj de Modo, Surdum Corda

**Miroslav Švandrlík** – Fluganta krokodilo (*tradukis M. Tyrala*)

**Schulhof** – Vi feliĉaj homoj ĉiutagaj

La adreso [www.literaturo.dk](http://www.literaturo.dk) proponas kompreneble multajn aliajn verkojn de alinaciaj esperantistoj, originalojn same kiel tradukojn, kaj ankaŭ ligojn al aliaj literaturaj retejoj, kie oni povas trovi riĉan beletron en Esperanto. La legemuloj, kiuj volas uzi kaj ekzerci la lingvon trovas tie sufiĉe abundan kolekton de legindaĵoj. -mm-

## Ĉu vi havas informilojn pri via urbo?

Viktor Dvořák el Moravské Budějovice interkonsentis kun s-ro Kratochvíl el Turisma Inform-Centro en Prago, ke esperantistoj sendos al li informilojn el siaj urboj aŭ vilaĝoj, ne nur esperantlingvaj, ekz. po 100 ekzempleroj, por ke turistoj povu ricevi materialojn pri niaj civitoj kaj iliaj vidindaĵoj. Do se vi volas propagandi vian urbon, sendu prospektojn al:

Turistické informační centrum o ČR  
Staroměstské náměstí 5

Jan Kratochvíl

tel: 224 861 476

e-mail: [jkratochvil@czechtourism.cz](mailto:jkratochvil@czechtourism.cz)

## Dua vivo

Dua vivo (angle Second Life) estas virtuala mondo en la interreto, kie ĉiu povas aliĝi senpage al jam ekzistantaj grupoj aŭ pagi kaj fondi propran grupon. Ekzistas jam Esperanto-grupo, kiu proponas kursojn kaj babilejojn kaj informajn filmetojn pri Dua Vivo. Inter la uzantoj estas ekz. Renato Corsetti, Anna Löwenstein, Katalin Kovats. La babilejo funkcias en certaj horoj, tial por unu babilanto povas esti mateno, por alia vespero kaj por la tria noktomezo, sed dependas de ilia interkonsento. Se vi volas partopreni, iru al jenaj adresoj:

<http://duavivo.webs.com/duavivochufren ezajho.htm>

<http://duavivo.wordpress.com/esperanto-komunumo-esperanto-lando/> -mm-

## Scii la himnon parkere estas morala devo

La streboj de esperantistoj montri sin pozitive al la ekstera mondo ofte fiaskas pro la nekapableco de esperantistoj mem agi profesie. Unu el tiaj hontigaj momentoj por la Esperanto-movado, kiun la gazetaro povas observi ĉiujare, estas kiam dum la inaŭguro de la Universala Kongreso oni proksimiĝis al la fino kaj sekvas komuna kantado de la himno. Same kiel pri la civitanoj de ĉiu lando oni supozas, ke ili konas la vortojn de la himno de sia patrujo, oni nature supozas ke ankaŭ la esperantistoj apud sia flago (kiu grandega pendas en la kongresa salono) konas parkere la tekston de sia himno. Tial ekstera observanto povas grande miri, kiam la esperantistoj anstataŭ ekkanti mutas, aŭ komencas brueti haste foliumante tra la kongreslibro por trovi la lastan paĝon, kien la organizantoj konsciaj de la problemo metis la tekston por savi tiujn kiuj ĝin parkere ne konas. Tio estas pardonebla ĉe komencantoj, sed estas vere hontinde, se iu estas multjara esperantisto aŭ estrarano de Esperanto-organizo, faris jam multajn atingojn, kaj tamen neniam en sia vivo mem prenis la tempon por lerni la 3 strofojn (aŭ 24 liniojn, aŭ 118 vortojn):

En la mondon venis nova sento,  
Tra la mondo iras forta voko;  
Per flugiloj de facila vento  
Nun de loko flugu ĝi al loko.  
Ne al glavo sangon soifanta  
Ĝi la homan tiras familion:  
Al la mond' eterne militanta  
Ĝi promesas sanktan harmonion.  
Sub la sankta signo de l' espero

Kolektiĝas pacaj batalantoj,  
Kaj rapide kreskas la afero  
Per laboro de la esperantoj.  
Forte staras muroj de miljaroj  
Inter la popoloj dividitaj;  
Sed dissaltos la obstinaj baroj,  
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,  
Komprenante unu la alian,  
La popoloj faros en konsento  
Unu grandan rondon familian.  
Nia diligenta kolegaro  
En laboro paca ne laciĝos,  
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro  
Por eterna ben' efektiviĝos.

La mankantan konon de la teksto de La Espero inter la esperantistoj rimarkis ankaŭ la iama estrarano de UEA, japano Hori Jasuo, kiu okaze de la 95-a UK en Kubo fondis neformalan "Societon por parkere kanti la himnon Espero". Ĝiaj reguloj estas simplaj:

La estraranoj Hori Jasuo, Hoŝida Acuŝi kaj Tahira Masako ekzamenis antaŭ kaj dum la UK jam 18 personojn, el kiuj ĉiuj sukcesis. Sekve tiuj homoj rajtas mem ekzameni aliajn kandidatojn kaj post ilia sukceso oni laŭ rekomendo de la ekzameninto atribuos membrecon kaj rajton ekzameni ankaŭ al ili. Tiumaniere oni plimultigos la sukcesintojn. Aldone ĉiu sukcesinto ricevas de la estraro belan atestilon pri sia kapablo.

Unua sukcesinto kaj rajtigita ekzamenanto inter ĉeĥaj esperantistoj estas Marek Blahuš, kiu trapasis la ekzamenon dum la UK en Kubo sub kontrolo de la estraranoj mem. Kvankam sen muzik-talento, li sukcese publike deklamis la tekston kaj pro tio tuj surloke ricevis de



Hori Jasuo belan atestilon – ĉar la stoko de la antaŭpreparitaj tiam estis jam elĉerpita, lia atestilo estis verkita de Hori Jasuo mem permane, sur speciala papero per belega tradicia japana penika kaligrafio.

La Societo por parkere kanti la himnon Espero nun serĉas novajn adeptojn. Ĉeĥaj, sed ankaŭ alilandaj esperantistoj estas invitataj lerni la tekston de la himno kaj demonstri sekve sian konon al iu el la rajtigataj ekzamenantoj. Tio eblas laŭ persona interkonsento, aŭ dum Esperanto-renkontiĝoj dum kiuj ĉeestas membro de la societo aŭ la societo organizas sian kunvenon. Por demandi pri la venontaj ebloj, kontaktu Marek Blahuš (retpoŝte: [laespero@blahus.cz](mailto:laespero@blahus.cz)) aŭ Hori Jasuo (10-27 Simosinden Maebasi Gunma 371-0822 Japanio; retpoŝte: [hori-zonto@water.sannet.ne.jp](mailto:hori-zonto@water.sannet.ne.jp)).

Se vi jam scias, pruvu kaj petu vian atestilon tuj! Kaj se vi ne scias, lernu kaj faru same. Eĉ se vi eble ne aparte ŝatas la himnon – finfine, parkerigo de io ajn ĉiam estas sana cerba ekzerco.

*Marek Blahuš kaj Hori Jasuo*

## Z překladatelských zásad

Velmi častou chybou českých esperantistů bývá (pod vlivem mateřštiny) kladení podmětu za sloveso: *Odpoledne byla jeho přednáška přečtena - Posttagmeze estis lia prelego laŭtvoĉe legata - Správně: Posttagmeze lia prelego estis laŭtvoĉe legata.*

Překládat se mají nikoliv jednotlivá slova, nýbrž **myšlenky**, **situace**, **obrazy** a **účinky**. Protože výše uvedený příklad neznamena, že si někdo přenášku přečetl v duchu pro sebe (*la prelego estis tralegita*), nýbrž že byla nahlas čtena před publikem, je lépe tento obraz vyvo-

lat upřesněním myšlenky (*la prelego estis laŭtvoĉe legata*). Tím se dostáváme k tomu, že není žádnou hanbou přeložit **jedno slovo** originálu **několika slovy** překladu. I čeština musí některé esperantské výrazy překládat opisem: *enpoŝigi* = strčit do kapsy; *gesolaj* = sami dva, on a ona; *skribota* = má být napsáno, *amikina* = přátelský, mezi přítelkyněmi.

Někdy snaha přeložit slovo opět jedním slovem za každou cenu vede k vymyšlení obludných složenin, které k sobě přitahují čtenářovu pozornost a odpoutávají ji od obsahu textu. Naopak zdánlivě nemastný neslaný překlad nemusí být vždy chybou. Výraz **vycenit zuby** překládá francouzština prostě jako **ukázat zuby** (*montrer les dents = montri la dentojn*) a **můj bourák** překládá angličtina jako **mé staré velké auto** (*my old big car = mia malnova granda aŭto*). Esperanto umožňuje více variant (*montri minace la dentojn, vidigi la dentojn, nudigi la dentojn, mia aŭtego, mia ĉaro, mia ĉarego*), ale musíme vždy dbát, aby šlo o správné esperanto. Pro různé konkrétní situace pak může být vhodná pokaždé jiná varianta.

Každý jazyk má svůj systém výrazových prostředků, které se s jiným jazykem kryjí jen částečně. Proti české řadě *stůl - stolek - stoleček* má esperanto *tablo - tableto - tablego - tablaĉo*, proti *chlapec - hoch - kluk - děti - děcka* stojí *knabo - bubo - infanoj - geknaboj - gebuboj*, proti *přátelský* máme *amika - amikina - geamika - amikara*. Překladový jazyk má obvykle k dispozici výraz buď slabší nebo silnější, takže překladaťel se neustále rozhoduje, zda je lépe nedosolit nebo přesolit. Musí usilovat o určitou vyváženost, jednou zvolí výraz mírnější, jindy silnější. (*pokrač. str. 124*)

## Ĉu uzi la nomon Brno aŭ Brunno?

En la jaro 2005 mi redaktis la kolekton de prelegoj prezentitaj en la konferenco okazinta la 4an de decembro 2004, la titolo de la 56-paĝa broŝuro estas „Verda duopo – Vondroušek, Scheiber – 1904-2004“ (ankoraŭ mendebla ĉe M. Malovec por 50 Kč).

Kun Zdeněk Hršel ni tiam interkonsentis, ke la urbon Brno ni esperante nomos Brunno, ĉar la urbo meritas asimilitan nomon en Esperanto pro ĝia signifo en la Esperanto-movado kaj krome, laŭ aserto de Hršel la formo Brunno estis uzata jam en la 1920-aj jaroj.

Pluraj legintoj de la kolekto pri la nomo Brunno miris, akceptadis ĝin embarasitaj, pluraj voĉe protestis asertante, ke tiu formo estas superflua, la ĉeĥa formo Brno ja finiĝas per la esperanta substantiva finaĵo -o kaj povas esti uzata tiel, ankaŭ en derivaĵoj. Kaj vere, de tempo al tempo mi renkontas la formojn *Brnon*, *brna*, *brnanoj*. Eĉ elstaraj ĉeĥaj esperantistoj ilin uzas opiniante, ke ili pravas. Sed nepre ne pravas, ĉar en tiuj formoj aperas la silabo „br“, kiu en Esperanto ne ekzistas. Laŭ PAG § 19 *ĉiu vokalo, escepte de ŭ, respondas al aparta silabo*, laŭ § 17 *ĉiu vokalo, sola aŭ kun la apudaj konsonantoj, formas unu silabon*. Sen vokalo en Esperanto ne ekzistas silabo!

La ĉeĥaj konsonantoj r kaj l, en Esperanto nomataj „likvidoj“, formas la ĉeĥajn silabojn *br*, *cr*, *kr*, *vl* ktp., ekzemple en la vortoj *Br-no*, *zr-no*, *sl-za*, *Vl-ta-va*. En Esperanto tio ne eblas.

Pri la afero mi plurfoje parolis en kunvenoj, seminarioj, tamen mi plu kaj ofte aŭdadas la derivaĵojn de la nomo Brno: *Brnon*, *brna*, *brnanoj*, kvazaŭ la nomo Brno estus asimilita esperanta nomo.

Antaŭ mi kuŝas dokumento el la ĉeĥa esperanta pratempo, nome la internacia mane skribita cirkula gazeto *Rondiranto: Arbara Stelo*, kiun organizis kaj estris la ĉeĥa arbaristo Augustin Toman el Bystřice pod Hostýnem, numero 2, el marto 1903. La

ekzisto de tiu iniciato estas forgesita, la nomo de Augustin Toman kaj de lia cirkulero ne estas menciitaj eĉ en la historio kompilita de Stanislav Kamarýt, eldonita de ĈES en 1983. Imagu, ke jam en 1903 en „Arbara Stelo“ A. Toman en la rubriko „Liberaj voĉoj“ skribis pri Brunno (citaĵo):

*En la lasta tempo estas rimarkinda la disvastigado de abstinenteco. Tiu tre nobla ideo devetus esti ankaŭ de ni esperantistoj kiel eble plej multe subtenata. En Brunno komencis eliradi nur pri tiu ĉi afero sin okupanta gazeto monata, tre malmultekosta, cent helerojn por tuta jaro. Adreso: Administracio de Blaho lidu en Brno, Frömlova ulice 16.*

Komence de la 20a jarcento Brno ne estis tiom grava kiel nuntempe. La nombro de loĝantaro kreskis al 400 000. Rimarkeble tie kreskis la kulturaj kaj lernejoj establaĵoj, nuntempe en Brno estas ses altlernejoj de universitata tipo, la plej granda estas la Universitato Masaryk kun preskaŭ 40 mil studentoj. Gravaj estas pluraj industriaj entreprenoj. Antaŭ la dua mondmilito kaj kelkajn jarojn poste Brno estis la ĉefurbo de Moravio (en la jaro 1949 la landa administra strukturigo en Ĉeĥoslovakio estis likvidita.) Fondiĝis la tradicio de la monde konataj foiroj. Rilate al Esperanto Brno elstaras pro la unua esperantista klubo en tiama Aŭstria-hungaria regno, en la 1930aj jaroj ankaŭ pro la tutmovade konata Verda Stacio. En Esperantio do la nomo Brunno estas facile defendebla. Ĝian formon el la vidpunkto etimologia ni serĉu en la latina nomo por Brno: *Bruna*. Nuntempe estas ofte uzata la latina adjektivo *brunensis*.

La rekomendo: En la nominativa substantiva formo estu Brno, allasebla estu ankaŭ la formo Brunno, kiu reale ekzistas jam 107 jarojn. Sed la derivaĵoj nepre ne enhavu la senvokalajn silabojn, oni do uzadu la formojn: *brunna*, *brunnanoj* ktp., aŭ oni uzu iun priskriban formon, ekzemple „la loĝantoj de Brno“, „la urbodomo de Brno“ kaj simile.

*Jan Werner, 2010-08-31*

## Sojasun jogurtoj en Esperanto

La profesia ekspoziciego SIAL okazis apud Parizo inter la 17-a kaj la 21-a de oktobro 2010. Inter ties pli ol kvinmil budoj, unu el la grandaj estis tiu de Triballat. Sur tiu ĉi, kune kun diversaj produktoj kaj novaĵoj, videblis pakaĵo de la jogurtoj Sojasun tute en Esperanto! Ĝi estis prototipo tie prezentata estante kandidato por novigpremio. Esperantigis ĝin la kompanio LinguaForce en Rennes.



Olivier Clanchin, estro de Triballat, klarigas sian intereson pri Esperanto:

Konsideri la morgaŭon signifas ankaŭ konstrui eŭropan kulturon. Kiam oni parolas pri eŭropa kulturo, temas ankaŭ pri komunikado. Ni opinias, ke Esperanto povus esti modelo. Ni ne forgesu ke ni estas Eŭropo 27-opa. Se ni ĉiuj havus komunan lingvon, tio plirapidigus multajn progresojn. Kie oni parolas pri malpligrandigo de pakaĵoj, kiel fari per tiom da lingvoj kiom da landoj, kiam oni volas eksporti unusolan produkton? Kiam vi aĉetas hejmajn aparatojn, kiom da kilogramoj da papero, da manlibroj, estas en ĉiuj lingvoj? Esperanto estas la sola justa lingvo... ĉar neniu naskiĝas kun ĝi.

[www.linguaforce.com/wawawoo/esperanto/sial2010.html](http://www.linguaforce.com/wawawoo/esperanto/sial2010.html)

(laŭ RET-INFO)  
foto LinguaForce

## Opero pri Esperanto

La svisa artista duo UMS 'n JIP, kiun formas Ulrike Mayer-Spohn kaj Javier Hagen, enmetis Esperanton en sian elektropopon ĉambro-operon *Three*, kies premiero okazis la 15-an de oktobro 2010 en Bazelo. La angla titolo, kiu signifas Tri, aludas, ke la duo jam realigis du muzikajn dramojn (*One* en 2008, *Two* en 2009). Ĉar Javier Hagen estas bofilo de d-ro Pavel Lehký, fondinto de E-lingvo, oni facile povas suspekti, kiu inspiris al li la ideon pri Esperanto.



Ne temas pri klasika opero kun drama rakonto, sed pri moderna muziko kun multaj efektoj. La ensemblo prezentas sepdekon da koncertoj jare kaj ankaŭ por la nova verko ĝi jam ricevis multajn invitojn. Ili kunlaboras kun multaj komponistoj kiel Heiner Goebbels, Wolfgang Rihm, Du Yun, Beat Gysin, Junghae Lee, Erik Oña kaj aliaj.

La vizitantoj de la koncertoj ricevas germanlingvan prospekton, kiu informas ilin pri Esperanto kaj ĝia movado kaj pri la ebla solvo de la komunikado en Eŭropo pere de la internacia lingvo „por ke Eŭropo interkompreniĝu“.

-mm-

# Jak vyjádřit české „mít udělat“?

Obvykle se uvádí, že tento výraz je slabší rozkaz, tedy slabší *muset*, ale většinou se jedná spíše o **vzkaz od vyšší autority**. Věta *musíte jít k řediteli* vyjadřuje objektivní nutnost (něco závažného se stalo, co se musí oznámit), kdežto *máte jít k řediteli* je vzkaz od ředitele samotného (jeho pozvání). Když dítě řekne řemeslníkovi *strýčku, máte jít k obědu*, znamená to *maminka vás zve na oběd*. Když totéž dítě řekne bratrovi *máš skočit pro mléko*, značí to *maminka ti nařizuje, abys jí šel koupit mléko*. Takto to funguje ve 2. osobě.

V první osobě tímto obratem vyjadřujeme **úkol nebo zákaz od vyšší autority**: *mám jít pro poštu, mám o tom napsat zprávu, nemám tam chodit* (nařídil nadřízený). V minulém čase **úkol nesplněný**: *měl jsem jít na poštu* (ale nešel), *měl jsem o tom napsat zprávu* (ale nenapsal), *neměl jsem tam chodit* (ale šel jsem tam). Poslední příklad má dva významy: 1. někdo mi zakázal tam jít, ale já neposlechl; 2. nikdo mi to sice nezakázal, ale ukázalo se, že to byla chyba či dokonce hloupost a doplatil jsem na to.

V třetí osobě takto nahrazujeme **prý**: *ten dům má být postaven za tři roky* (prý ho postaví za tři roky), *má to zařídit starosta* (prý byl ten úkol svěřen starostovi), *nemá se to přehánět* (není vhodné přehánět). V minulém čase opět nesplněný úkol: *měl tam jít* (ale nešel), *neměl to dělat* (ale udělal). V poslední době se stalo nesprávnou novinářskou módou (tzv. floskulí) používat i minulý čas ve významu **prý**: *lupič měl ukrást tři*

*miliony* (prý ukradl tři miliony), *řidič měl narazit do stromu a zabít se* (prý narazil do stromu a zabil se).

V otázce se tento obrat chová zase jinak: *Mám to vážně udělat?* = 1. Chcete to? 2. Myslíte, že je to správné? *Mám tu knihu položit na stůl?* = Přejete si to? *Mám skočit pro noviny?* = 1. Přejete si to? 2. Někdo mi to vzkazuje? 3. Sám se nabízím, že pro ně skočím. *Máš tam jít na oběd?* = Pozvali tě? *Máš se vystěhovat?* = Vyhodili tě? *Mají to postavit za tři roky?* = 1. To vážně chtějí zvládnout tak rychle? 2. To jim vážně bude trvat tak dlouho?

Obrat **mít udělat** je v češtině velice tvárný podle situace, a proto se podle situace musí také překládat. Zkuste se zamyslet, jak byste přeložili uvedené příklady a řešení zašlete redaktorovi: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, malovec@volny.cz. Nejzajímavější řešení uveřejníme v příštím čísle.

## Z překladatelských zásad

(pokrač. ze str. 121)

Zvlášť opatrní musíme být při překládání frazeologických obrátů, protože na stejnou situaci reaguje každý národ jinak. My *zvedáme sluchátko*, kdežto Angličani *odpovídají na telefon*. My se zeptáme člověka po operaci očí *už vidíte?*, kdežto Angličan *můžete nyní vidět?* Česká matka řekne dítěti *nemotej se mi tady*, francouzská *běž se podívat za dveře, jestli tam nejsem*. Česká loď se potápí *se vším všudy*, německá *s mužem i myší*. Čech hází *flintu do žita*, esperantista *hakilon en la lagon*, v češtině se máme jako *prase v žitě*, v esperantu jako *kuko en butero*.  
-mm-

# Jaromír Jermář

(1922-2010)



La 10-an de oktobro 2010 forpasis pro pulma embolio la iama prezidanto de ĈEA, D-ro **Jaromír Jermář**.

Li naskiĝis la 10-an de julio 1922 en Frenštát pod Radhoštěm. Ĝis sia 16-a jaro (1938) li vivis en Opava, sed post anekso de la ĉeĥoslovakaj limregionoj li abiturientiĝis ĉe reala gimnazio en Prago en 1941. Komercan akademion en Zlín li finis en 1944, ĉe Karola Universitato li doktoriĝis en 1953 kaj kandidato de filozofiaj sciencoj li fariĝis en 1964. Kiel sciencisto li laboris ĉe Instituto por Filozofio kaj Sociologio de Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj kaj dum la tuta vivo li okupiĝis pri etnaj problemoj, ankaŭ en Esperanto li verkis fakan artikolon *Etnaj problemoj kaj interlingvistiko*.



*Kontrakto kun Rekrea 4.11.1981*

En la Esperanto-movado li laboris kiel prezidanto de Ĉeĥoslovaka Esperantista Komitato (1958-1965), post refondo de la asocio en 1969 kiel asocia komitatano kaj gvidanto de *Komi-*

*siono por Historio kaj Teorio de Internacia Lingvo*, inter 1979 kaj 1987 kiel asocia prezidanto. En tiu funkcio li subskribis kontrakton kun la vojaĝ-agentejo Rekrea, sed la esperata kunlaboro fine ne realiĝis.



*František Zajíček kaj Jana Čichová intervjuas d-ron Jermář en Radio Praha 1963*

Kvankam komunisto, en Starto 1969 la demandon *Kiu lastjara evento vin impresis plej multe kaj kial?* li respondis jene: „*La fakto, ke kelkaj esperantistoj, speciale la bulgaraj (vidu Nuntempan Bulgarion 1968/9, La Pacaktivulon 1968/77), sed ankaŭ la aliaj pli bone konas la situacion en Ĉeĥoslovakio ol la ĉeĥoj kaj slovakoj mem. Ili eĉ sukcesis trovi ĉe ni kontraŭ-revolucion kaj konas tiujn, kiuj invitis fremdajn armeojn eniri Ĉeĥoslovakion. Ni ankoraŭ ne. La fakto, ke absoluta plejparto de tutmondaj esperantistoj simpatias kun ni, kredas al ni, ne al aŭtoroj de Blanka libro pri Ĉeĥoslovakio kaj aliaj mensogaj pamphletoj, eĉ se ili aperas en Esperanto.*“

En 1994 aperis ĉeĥlingve ankaŭ liaj poemoj sub la titolo *Tiuj ĉi kaj aliaj tagoj*. Plie li verkis – ĉeĥlingve – antaŭparolojn por katalogoj de ekspozicioj pri pentroarto. -mm-

# KALENDARO

2010-12-29 E-Silvestro en Česká Třebová,  
[jk.esperanto@seznam.cz](mailto:jk.esperanto@seznam.cz)

## Kalendaro 2011

2011-04-1/3 La 6-a Sabla Printempo, ĉi-foje en Milevsko. Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)

2011-04-11/16 Lingva seminario en Skokovy. Aranĝo de AEH, sed ne nur por handikapitoj. Info: [nechvilep@seznam.cz](mailto:nechvilep@seznam.cz)

2011-04-15/29 Flugkaravano al Ĉinio lige al la Internacia Esperanto-Konferenco en Wuhan pri la temo „La ĉina saĝo“. Info: [www.kava-pech.cz/wuhan](http://www.kava-pech.cz/wuhan), [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz).

2011-05-07/14 La 63-a IFEF-kongreso, Liberec, Kongresa centro Babylon. Info: [ladislav.kovar@tiscali.cz](mailto:ladislav.kovar@tiscali.cz)

2011-05-21 110 jaroj de Esperanto en Brno

2011-06-04 Inaŭguro de nova ekspozicio en Esperanto-Muzeo Svitavy pri la temo „Esperanto kaj spiritaj tradicioj de la mondo“, enkadre de Muzea Nokto. Info: [dvor.libuse@seznam.cz](mailto:dvor.libuse@seznam.cz)

2011-06-10/12 Solenaĵo omaĝe al centjariĝo de Esperanto-klubo en Olomouc. Info: [dudajanol@centrum.cz](mailto:dudajanol@centrum.cz)

2011-06-18 Infana tago en Svitavy. Info: [dvor.libuse@seznam.cz](mailto:dvor.libuse@seznam.cz)

2011-06-19 Tradicia renkontiĝo (jam 75 jarojn!) de ĉeĥaj, polaj kaj slovakaj esperantistoj sur la pinto de la monto Ĉantorio sur ĉeĥa-pola landlimo. Info: [suchanekj@seznam.cz](mailto:suchanekj@seznam.cz)

2011-07-03-/16, 07-17/30, 07-31/08/13 Tri etapoj de la 59-a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov apud Vranov-lago. Info: [podhradska@volny.cz](mailto:podhradska@volny.cz)

2011-07-14/21 Kongreso de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) en Olomouc. Info: [priborsky@brailnet.cz](mailto:priborsky@brailnet.cz)

2011-08-02/09 Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) en Poděbrady. Info: [cea.polnický@quick.cz](mailto:cea.polnický@quick.cz)

2011-08-12/14 Renkontiĝo de iamaj partoprenantoj de Someraj Esperanto-Tendaroj en Lančov. Info: [podhradska@volny.cz](mailto:podhradska@volny.cz)

2011-09-10 Postferia renkontiĝo en Putim. Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)

2011-09-11/18 EKOTUR 11. Tradicia eko-turisma renkontiĝo por biciklantoj kaj piedturistoj en Dobřichovice (itinerroj en Bohemia Karsto kaj montetaro Brdy). Info: [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

2011-10-07/09 Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Šumperk. Info: [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz), [Tomecek@esperanto.cz](mailto:Tomecek@esperanto.cz),

2011-12-10 Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek. Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)

## Arthur Baur

(1915-2010)

La 17-an de septembro 2010 forpasis fama svisa esperantisto, honora membro de UEA, Arthur Baur. Li estas konata pro sia libro **La fenomeno Svislando**, sed li estis ankaŭ redaktoro de *Svisa antologio* kaj de *Svisa Esperanto-Revuo*. Dum pli ol 40 jaroj li gvidis Esperanto-elsendojn de *Svisa Radio Internacia*, aŭtoris plurajn germanlingvajn librojn pri Esperanto kaj esperantlingvajn pri la reto-romanĉa lingvo.

## NIA KRONIKO



La 1-an de decembro 2010 forpasis en Lanškroun Ing. **Zdeněk Polák** (1934-2010), iama aktivulo de ĈEA, instruanto en SET Lančov, tradukanto de fervojistaj artikoloj el kaj en Esperanton. Li laboris kiel edukisto de fervojistaj lernantoj, trajnekspedisto, edukanto de koreaj infanoj.



Merkrede, la 2-an de februaro 2011 nia prezidanto **Miloš Šváček** festos sian vivjubileon.

Ĉiuj liaj geamikoj kaj gefratoj per unu voĉo vokas DIO BENU!

*Doc.MUDr.ThDr.Mgr. Max Kašparů, Ph.D.*

## Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Poštovní spořitelny a ve většině poboček České pošty si vyžádáte **tiskopis VKLAD**, který vyplníte ve všech kolonkách: **částka Kč** - sumu, kterou platíte, **č. účtu**: 195 230 825/0300, **variabilní symbol**: má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete L. Hýblové seznam, za koho platíte. **Konstantní symbol** je 0379 a **název účtu** je: Český esperantský svaz. Stejná čísla uveďte na ústřížek, který slouží jako doklad o platbě. Platba je bez poplatku.

Seznam čísel (variabilní symboly):

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50200** sekce železničářů IFEF
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,  
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,  
vlastní b. ú. 86-7290070227/0100
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio

### Upozornění

#### pro sekce, kluby a kroužky ČES

Občanská sdružení jsou podle vyhl. 634/2004 Sb. osvobozena od placení poplatků za ověření listiny - t.j. položka 4 - a za ověření podpisu - t.j. položka 5.

## Zájemci o časopisy

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, [cea.polnicky@quick.cz](mailto:cea.polnicky@quick.cz). Předplatné uhradíte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

### POZOR: změna PŘEDPLATNÉHO!

**Monato**: 1020,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 610,-Kč

**La Gazeto**: 550,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

**La Ondo de Esperanto**: 520,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 310,- Kč.

**Juna Amiko**: 240,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5

**Literatura Foiro**: 940,- Kč (\*620,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5

**Heroldo de Esperanto**: 1020,- Kč (\*680,- Kč), v.s. 07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A 3

**Femina**: 630,- Kč (\*420,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

**Litova Stelo**: 260,- Kč, v.s. 07008, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5

\*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

**Periodikum Českého esperantského svazu - 41. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**malovec@volny.cz**

**<http://members.chello.cz/malovec/>**

**Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:**

**p/a Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789  
62 Olšany, libusehyblova@seznam.cz,  
tel. 774 928 974**

**Uzávěrka příštího čísla: 1.2.2011**

-----  
**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio -  
- 41-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj  
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 10 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, malovec@volny.cz**

**<http://members.chello.cz/malovec/>**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero:  
1.2.2011**

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj:**

**1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**

## **ĈU ANKAŬ VI VOLAS IĜI DELEGITO DE UEA?**

**Se vi jam estas membro de UEA dum unu jaro  
kaj plenumas la ceterajn devojn, vi povas iĝi  
Delegito, Vicdelegito, Junulara Delegito aŭ  
Faka Delegito de ĝia Delegita Reto.**

Plenigu la respondilon en la Reta Jarlibro aŭ elŝutu tiun ĉe  
[www.uea.org/asisto.html](http://www.uea.org/asisto.html), plenigu ĝin kaj sendu al via  
ĉefdelegito. Nur se mankas ĉefdelegito en via lando,  
sendu la plenigitan respondilon al la Centra Oficejo.

**ALIĜU AL NIA RETO!**

## **Vinilkosmo**

preparis sub vian Kristnaskan arbon du diskojn  
kun muzikaĵoj: „Trajn' nenien“ kaj „Urbano“:  
**[www.vinilkosmo.com](http://www.vinilkosmo.com).**

## **PF 2011**

**La asocia komitato deziras al ĉiuj  
membroj kaj legantoj sukcesan jaron  
2011!**

